

### **KURSO REKOMENCIĜOS EN SEPTEMBRO**

La kurso de Esperanto en la madrida sidejo komenciĝos denove la 17an de septembro. Kiel kutime, ĝi disvolviĝos la sabatojn matene, en du niveloj. De la 11:00 ĝis la 12:00 por la baza nivelo kaj de la 12:00 ĝis la 13:00 por la supera (progresanta) nivelo.

La baza kurso startos de la plej unuaj konceptoj, fakte, ekde la unua leciono de la metodo de Miguel Gutiérrez Adúriz, kaj do, ĉiuj kiuj konas homojn interesatajn en la lernado de Esperanto, povas informi ilin pri tiu ĉi kurso. La pago estas tute simbola, nur 5 eŭroj por la novaj lernantoj.

Por informiĝi kaj aliĝi, oni skribu mesaĝon al la instruisto, Juan del Castillo, ĉe la adreso [juandelcastillomartinez@gmail.com](mailto:juandelcastillomartinez@gmail.com) aŭ al la adreso de MEL: [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es).

### **PREMIOJ POR HEF KAJ POR HISPANAJ ESPERANTISTOJ**

Dum la 101 Universala Kongreso en Nitro (Slovakio), estis disdonitaj diversaj premioj, por beletro aŭ por elstara agado.

La Fondaĵo Antoni Grabowski kies celo estas subteni la Esperantan kulturon per premioj kaj subvencioj, aljuĝas premiojn meze ĉiun duan aŭ trian jaron. En la Nitra UK estis anoncitaj la ĉi-jaraj premioj. La duan premion (kun ekonomia subteno de 300 usonaj dolaroj) ricevis Hispana Esperanto-Federacio pro *Bitoteko*, sia elektronika biblioteko, “per kiu ekde 2013 elstaraj verkoj estas facile kaj senkoste alirebligataj al la publiko – laste, okaze de la 400-a datreveno de la morto de Miguel Cervantes, Donkiĥoto en la traduko de Fernando de Diego” (laŭ la citaĵo de la premio mem).

Aliflanke, ankaŭ al Hispanio venis kolekto de premioj en la Belartaj Konkursoj de UEA. Nia madrida samgrupano Jorge Camacho Córdón ricevis duan premion en la branĉo eseo, pro “La vartisto de vortoj”. La unuan premion en la branĉo poezio ricevis Antonio Valén, pro “Paralele”.

### **DON QUIJOTE DE LA MANCHA, DISPONEBLA ĈE MEL**

Kiel ni informis en la pasinta bulteno, dum la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, estis prezentita la bita eldono de “La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha”, la traduko al Esperanto de la senmorta verko de Miguel de Cervantes. La verko estas je ĉies dispono, libere kaj senpage, en formato epub, en la *Bitoteko*, kaj oni povas trovi la ligilojn al la verko kaj pliajn informojn pri la projekto en la retadreso <http://esperanto.es/quijote>.

Hispana Esperanto-Federacio eldonis ankaŭ fizikan karton, enhavantan la dosieron de la verko, kiun oni povas aĉeti kiel memoraĵon aŭ por donaco. La karto estas ornamita per la nova ĉefpaĝo de la verko, dizajnita speciale por tiu ĉi eldono, kaj je la dorso entenas la emblemon de la Ŝtata Komisiono por la 400-a datreveno de la morto de Miguel de Cervantes, kiu inkludis tiun ĉi agadon en sia oficiala programo kaj donis al HEF permeson por uzi la simbolon.


Ekzemplerojn de la karto eblas aĉeti ĉe Madrida Esperanto-Liceo. Skribu al [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es) por koni la detalojn.



**RENKONTETO EN SOMERO**

Ĉijare ne okazis multaj renkontoj de esperantistoj dum la madrida somero.

Tamen, la 4-an de aŭgusto estis organizita improvizita plurlanda renkontiĝo, profitante la viziton de Namir, kiu revenis survoje al la Dominga Respubliko post sia partopreno en la UK. Ĉeestis ankaŭ Eduardo (Zaragoza), Alex, Andy (Kubo) kaj Pietro (Italio)

**VENONTAJ RENKONTIĜOJ**

La 24-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazos ekde la 1-a ĝis la 9-a de oktobro en urbo Cambrils (provinco Taragono, Katalunio). En la programo oni antaŭvidas prelegojn de Rodica Todor, Gian Carlo Fighiera, Peter Zilvar, Rudolf Fischer, Zofia Korody, Aldis Bušs, inter aliaj. Oni aljuĝos novan eldonon de la Premio Ada Fighiera-Sikorska. Okazos ankaŭ debatoj, folkloraj vesperoj, kursoj kaj aliaj aktivadoj. Ekskursoj estas antaŭviditaj al Parko Samá en Cambrils, Morella kaj Peñíscola. Por aliĝoj kaj pliaj informoj, kontaktu kun Luis Serrano ĉe [luis\\_serrano@ya.com](mailto:luis_serrano@ya.com).



Andalusia Esperanto-Unuiĝo okazigos sian 20-an Kongreson de la 29-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro en la urbo Antekero (Antequera, provinco Malago). Ĝi disvolviĝos en luksa kaj bela salono ene de la Municipa Muzeo de la urbo, kaj oni ĝuos prelegojn, deklamadon de poemoj, prezenton de novaj libroj, ludoj, ktp. Oni vizitos la monumentan urbon mem, kies megalitaj dolmenoj estis agnoskitaj kiel Heredan Havaĵon de la Homaro, kaj la naturajn belaĵojn "El Torcal" kaj la mondkonatan vojon "Caminito del Rey". Pliajn informojn: <https://andaluciaesperanto.wordpress.com/>.

**KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

La kutimaj kunvenoj de MEL komenciĝis la 29-an de aŭgusto post la somera paŭzo, kaj plu okazos ĉiulunde post la 18,30. Oni nun pretigas por la 26-a de septembro, okaze de la Eŭropa Tago de la Lingvoj, specialan debaton pri la temo ***Nova lingvopolitiko en la Eŭropa Unio***. Proponoj kaj kontribuoj por la debato estas bonvenaj, kaj ni esperas je ĉies partopreno.

La kutima sabata babilado ankoraŭ ne estis kunvokita por tiu ĉi monato. Ĝi okazos verŝajne la 10-an de septembro. Atentu forumojn kaj sociajn retojn por koni la detalojn.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, la liston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrid/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)